Esperanto
V-22632 1938

# LIGILO POR VIDANTOJ

**Organo de UNIVERSALA ASOCIO DE BLINDUL-ORGANIZAĴOJ.**

**Numero 25—26** Redakcia komitato: **Jaro 1938**

*F-INO LIDJA ZAMENHOF, Warszawa, Pollando; DIREKTORO VELJKO LJ. RAMADANOVICH, Zemun, Jugoslavio; KAPITANO JAN SILHAN, Lwów, Pollando; W. P. MERRICK, Penso, Shepperton, Anglujo; HARALD THILANDER, Stocksund, Svedujo.*

## Senliman dankon!

*Humilan, senliman dankon pro la lavangoj da amikaĵoj, kiuj faladis sur min okaze de la sesdeka datreveno de mia naskiĝotago! Al mi estas grandega kuraĝigo konstati, ke mi havas tiom da geamikoj.*

*Tamen, kiam mi diras al vi, geamikoj, ke mi vere ne komprenas, ke mi meritas tiom da honoro, tiom da dankado, tio estas mia sincera kaj senafekta opinio. Mi laboris, laboradis. Jes, ĉar tio estis mia plej kara plezuro. Mi sentas, ke mia laboro estas utila — tio estas mia salajro kaj rekompenco. Do, nenio dankinda, ĉar mian meritan salajron mi jam ricevis. Sed via amikeco, gekaruloj, estas por mi granda trezoro, pro kiu mi ĝojegas. Ho, kiel mi nur povos danki pro ĝi!*

*Grandegajn donacojn mi ankaŭ ricevis en mia naskiĝotago. Mi ne mencios ilin, kvankam ili estas valoregaj. Mi nur dankas el plena koro.*

*Eble interesos vin aŭdi ion, kio al mi ŝajnas amuza, preskaŭ nekredebla: Kelkaj el miaj intimaj geamikoj (iniciatintoj estis gesinjoroj Merrick el Anglujo) sendis kun unu el la someraj numeroj de "Esperanta Ligilo" kaj ankaŭ kun "Ligilo por Vidantoj" iun alvokon pri mia naskiĝotago, kaj mi, kvankam redaktoro, ne suspektis tion eĉ dum unu momento, ĝis la tago antaŭ mia naskiĝotago, kiam du gratulantoj aludis la aferon! Tiel miaj geamikoj sciis gardi sian sekreton.*

*Kun miaj sentoj de dankemo kaj ĝojo miksiĝas forta sento de honto, ĉar mi scias, ke mia laboro estas trotaksata. Mia deziro plej arda estas, ke mi, estonte pli ol ĝis nun, meritos viajn afablaĵojn.*

*Harald Thilander.*

# La 60-jara festo de redaktoro Thilander.

La 25-an de oktobro okazis la sesdeka datreveno de la naskiĝo de nia admirata kaj amata pioniro kaj gvidanto, sinjoro redaktoro Harald Thilander. La tago estis grandioza manifestado pri la admiro kaj takso, kiun blinduloj kaj blindulamikoj el plej diversaj landoj kaj sociaj klasoj sentas por la laboro de nia grandanima sortofrato.

De frumatene ĝis malfrua vespero floroj kaj telegramoj alvenadis al la hejmo de gesinjoroj Thilander. Entute venis cento da telegramoj svedaj kaj alilandaj (eĉ el Usono) de ŝtataj oficistoj, estraroj de organizaĵoj de kaj por blinduloj, inter aliaj ankaŭ de s-ro kapitano Jan Silhan por UABO, lernejestroj, esperantistaj asocioj kaj kluboj. Telegramoj venis ankaŭ de prizorgatoj de aziloj kaj hejmoj por maljunuloj.

Dum la tago venis deputacioj, kiuj transdonis esprimojn de respekto kaj bondeziroj de la sveda tutlanda blindulorganizaĵo "De blindas förening", de la fondo "Libroj por blinduloj", de la "Porblindula laborkomisiono de kronprincino Margareta" kaj de aliaj organizaĵoj de kaj por blinduloj. S-ro Verner Ljunggren, Stockholm, transdonis mondonacon kaj gratulojn de blindaj esperantistoj el dudek landoj. La nomoj de la gratulantoj estis skribitaj en bela libro, kiun bindis kiel sian kontribuaĵon "The National Institute for the Blind" en Londono. La blinduloj en Svedujo kaj en Danujo estis aranĝintaj apartajn kolektojn, kies rezultojn ankaŭ transdonis s-ro Ljunggren.

La germanaj blindaj esperantistoj kolektis monon kaj sendis por ĝi aĉetitan modernan punktskriban maŝinon.

La samideanoj-samsortanoj de Hungarlando sendis bele binditan libron entenantan la nomojn de ĉiuj blindaj esperantistoj hungaraj.

Iom pli malfrue venis por transdoni gratulojn de siaj organizaĵoj reprezentantoj de "Internacia Esperantoligo", "Sveda Esperantofederacio", "Stokholma Esperantoklubo", "Sveda Esperanto-Instituto" kaj "Eldona Societo de Esperanto". Ĉiuj kunportis florojn kaj bele faritajn adresojn.

La 26-an de oktobro gesinjoroj Thilander aranĝis festeton por eminentuloj de la blindulmovado en Svedujo kaj por siaj geasistantoj kaj personaj geamikoj. Inter la honoraj gastoj estis la pola konsulo en Stockholm, kiu en la komenco de la festo fiksis sur la bruston de s-ro Thilander la insignon de "Oficiro de Polonia Restituta". La konsulo diris inter alie, ke la registaro de Pollando decidis honorigi s-ron Thilander per tiu alta ordeno por montri, ke la pola popolo taksas "lian agadon por mildigi suferojn kaj helpi tiujn, kiuj bezonas helpon, kaj pro lia grandioza kultura laboro inter la blinduloj de la tuta mondo".

La festotagoj de s-ro Thilander montris klare, ke lia sindona tridekjara laboro por la blinduloj portis riĉajn fruktojn, kaj ke la samsortanoj ankaŭ komprenas la grandegan valoron de tiu agado kaj konfesas sian dankemon pro ĝi.

La plej grandaj svedaj ĵurnaloj enhavis fotografaĵojn kaj artikolojn pri s-ro Thilander, kaj ankaŭ multaj eksterlandaj gazetoj atentis lian festotagon.

Ni blindaj esperantistoj esprimas al nia nobla frato kaj sperte neniam laciĝanta gvidanto nian elkoran dankon pro ĉio, kion li faris, kaj ni deziras al li daŭran sanon kaj feliĉon. Ankoraŭ dum multaj jaroj lia saĝa, efika gvido estos nepre necesa por la bona progreso de nia afero.


Dio benu vin, nian heroon, nian gvidanton!

*Ch. H.*

## Redaktoro Thilander ree honorigita.

La dekkvinan de novembro 1937 la reĝo de Svedujo decidis nomi s-ron redaktoron Harald Thilander "Kavaliro de Vasaorden". Per tio ankaŭ la patrujo de s-ro Thilander montris sian takson de la grandioza laboro farita de li por la blinduloj. Tio ĉi estas la dua oficiala honorigo de s-ro Thilander dum kelkaj monatoj, kaj tiuj honorigoj estas des pli gravaj por nia tuta afero, ĉar ili estas kvazaŭ oficiala rekono de la signifo de nia internacia laboro. Ni kore gratulas nian grandaniman pioniron!

*Ch. H.*



Doktoro Milorad Ĉortanoviĉ

# La XV-a internacia kongreso de okulkuracistoj.

De la oka ĝis la dekkvina de decembro 1937, en Kairo (Egipto) okazis la XV-a internacia kongreso de okulkuracistoj. Dum la kongreso, krom pri fakaj aferoj, oni diskutis ankaŭ pri la blindulprizorgado.

La antaŭ nelonge fonditajn jugoslavan kaj tutslavan asociojn (vidu alian artikolon en tiu ĉi numero de L. V.) dum la kongreso reprezentis komitatano de ambaŭ organizaĵoj okulkuracisto s-ro doktoro Milorad Ĉortanoviĉ, kiu, kiel konata blindulamiko ankaŭ ĉi-okaze proponis siajn servojn al la blinduloj.

S-ro Ĉortanoviĉ promesis ankaŭ komplezeme reprezenti nian UABO en la kongreso, kaj nun ni havas la ĝojon ĉi-sube publikigi lian raporton pri la kongreso.

*Red.*

## Raporto de la reprezentanto de "Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj".

Kiel reprezentanto de la Unuiĝo de Blindaj Intelektuloj kaj Ekonomoj en Reĝolando Jugoslavio, Slava Asocio por Protektado de la Blinduloj kaj Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj ĉe la XV-a Internacia Kongreso de Okulkuracistoj, okazinta en Kairo de la 7-a ĝis la 15-a de Decembro 1937, mi havas la honoron prezenti jenan raporton:

La kongreso estis malfermita en la granda salono de la universitato Giza en ĉeesto de L. M. Reĝo Faruk, de la tuta egipta registaro kaj ĉirkaŭ 600 kongresanoj el la tuta mondo.

La kongresanojn salutis L. M. Reĝo Faruk mem, kaj flanke de la kongreso s-ro prof. d-ro Nordenson el Stockholm.

Dum la kongreso estis pritraktataj du ĉefaj temoj:

1) "Pligrandiĝo de l' arteripremo en retinoj"; kaj
2) "Influo de internaj glandoj je la okulo".

Krom pri tiuj temoj, dum la kunsido de la Internacia Organizacio por Batalo kontraŭ la Traĥomo oni diskutis pri traĥomo, pri ĝiaj sekvoj je la okulo kaj pri la kuracado.

Por la Unuiĝo de Blindaj Intelektuloj kaj Ekonomoj en Reĝolando Jugoslavio, Slava Asocio por Protektado de la Blinduloj kaj Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj la plej grava estis la kunsido de la Internacia Asocio por Batalo kontraŭ la Blindeco. Dum tiu kunsido diversaj parolantoj parolis pri la demando de la batalo kontraŭ la blindeco en la mondo kaj pri la batalmaniero kontraŭ la blindeco.

Tiu ĉi asocio estas kreita ankoraŭ en la 1929-a jaro, kaj ĝia sidejo estas en Parizo (adreso: Association Internationale pour la Prophylaxie de la Cécité, Paris VI, 66, Boulevard Saint-Michel). Membroj de la asocio estas multenombraj ŝtatoj.

Al la prezidanto de la asocio mi prezentis la Unuiĝon de Blindaj Intelektuloj kaj Ekonomoj en Reĝolando Jugoslavio kiel junan kaj novefonditan kaj petis lin pri ĝia akcepto en la asocion. Li promesis tion fari tuj kiam estos veninta la aliĝilo. Tio ĉi validas ankaŭ por la Slava Asocio por Protektado de la Blinduloj kaj Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj.

Mi ankaŭ venis en kontakton kun s-ro prof. d-ro Szymánski, fondinto de la institucio "Kuratorjum dla Ociemnialych", s-ro prof. d-ro Lauber, s-ro d-ro Zachert, reprezentanto de la Ministerio de Sociala Politiko, ĉiuj el Varsovio, kaj kun s-ro prof. d-ro K. Paŝev, prezidanto de la Unuiĝo por Protektado de la Blinduloj en Bulgario, el Sofia, kaj mi faris ĉion, por ke la kongreso ekokupiĝu ankaŭ pri la demando de la blinduloj, kion ĝi faris.

La kongresa konsilantaro dum la lasta kunsido, laŭ la propono de s-ro prof. d-ro Szymánski, krom aliaj punktoj de sia rezolucio, enmetis ankaŭ jenan:

"Ni plene konsentas helpi la dezirojn de la blinduloj en la batalo kontraŭ la blindeco, kio



Gesinjoroj V. kaj K. Ramadanoviĉ kun blindul-reprezentantoj el Pollando, Ĉekoslovakio kaj Bulgarujo kaj kun grupo da geinstruistoj institutaj je la festo de la Blindulinstituto en Zemun la 27-an de septembro 1937.

# Jubileaj festoj en Jugoslavio.

La 27-an de septembro 1937 okazis en la blindulinstituto en Zemun duobla festo. Estis festata la 20-jara datreveno de la ekzisto de la Zemun-a blindulinstituto, kaj samtempe kunlaborantoj de ĝia fondinto kaj direktoro s-ro Veljko Lj. Ramadanoviĉ aranĝis feston de la 40-jara datreveno de lia agado por la sociale malfortaj ĝenerale.

Al la jubileoj venis ankaŭ gastoj el Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio kaj Polujo.

Je la 11-a horo komenciĝis la festo en ĉeesto de reprezentantoj de la reĝo Peter II, de diversaj ministrejoj, de la konata jugoslava blindulamiko ĉefepiskopo s-ro Dositej, de la eksterlandaj gastoj, de humanistaj kaj fakaj instruistaj societoj kaj de grandega nombro de gastoj el Beograd, Zemun kaj aliaj urboj. Apenaŭ povis ĉiuj eniri en la grandegan ejon.

Unue okazis diservo kaj oni preĝis por la mortintaj bonfarintoj. Post la diservo blinda muzikinstruisto, s-ro Dimitrije Iliĉ parolis longe pri la vivo, agado kaj atingaĵoj de s-ro Ramadanoviĉ. Post li Peter Pesiĉ en la nomo de Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj transdonis al s-ro Ramadanoviĉ arĝentan plakon kun surskribo.

Post s-ro Pesiĉ parolis reprezentantoj de la blinduloj en Polujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Bulgarujo kaj de multaj polaj organizaĵoj kaj institucioj.

Posttagmeze, je la 16-a horo, okazis koncerto aranĝita de geedukatoj de la Zemun-a blindulinstituto.

---

evidentiĝas laŭ tio, ke ni jam en la 1929-a jaro fondis la Internacian Asocion por Batalo kontraŭ la Blindeco.

Koncerne la rezolucion de la blindula mondkongreso en Varsovio en la 1937-a jaro, ni petas la Internacian Asocion por Batalo kontraŭ la Blindeco ekagi en ĉiuj ŝtatoj en la mondo, ke pliboniĝu vivcirkonstancoj de tiuj, kiuj estas viktimoj de la blindeco — de senviduloj."

Por ni estas granda sukceso, ke tiel granda kaj la plej kompetenta forumo volas ekokupiĝi pri la blindul-demando kaj ke ĝi volas konsenti kun la decidoj kaj deziroj esprimitaj en la varsovia rezolucio.

Sed oni ne haltu ĉe tio. Por ke ni havu plenan sukceson, ni devas fari jenon:

1) en la Unuiĝo de Blindaj Intelektuloj kaj Ekonomoj en Reĝolando Jugoslavio, Slava Asocio por Protektado de la Blinduloj kaj Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj krei komitatojn por la batalo kontraŭ la blindeco; kaj

2) tiujn komitatojn tuj aligi al la Internacia Asocio por Batalo kontraŭ la Blindeco en Parizo, kun kiu ni kunlaborus je tiu agado kaj tiamaniere ni malpligrandigus la nombron de l' blindecviktimoj.

La 29-an de Decembro 1937, en Beograd.

*D-ro Milorad Ĉortanoviĉ, p. m.*
Okulkuracisto.

# RESOLUCIOJ

de la dekkvara internacia blindulkongreso kaj de la tria ĝenetalkunveno de "Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj" okazintaj en Varsovio de la 7-a ĝis la 15-a de aŭgusto 1937.

La kongreso, en kiu partoprenis 114 personoj el 14 landoj, pridiskutinte je bazo de 23 referatoj la ĉefproblemojn de la blindulafero, alprenis unuanime jenajn rezoluciojn:

1.

La kongreso emfazas la necesecon de energia, multflanka kontraŭbatalado de blindeco per levo de la popolhigieno, vasta aplikado de profilaktikaj rimedoj kontraŭ okulmalsanoj kaj akcidentaj blindiĝoj en industrio kaj per racia aplikado de l' principoj de l' eŭgeniko. La kongreso atentigas, ke laŭ opinioj de fakuloj ĝis 50 % de la blindiĝoj estas absolute eviteblaj, dum 25 % estas kondiĉe eviteblaj. Al la ŝtato kaj socio do malfermiĝas vasta agadkampo por konsiderinde redukti la nombron de nevidantaj civitanoj.

2.

La kongreso subtenas la rezolucion de l' Ligo de Nacioj de la jaro 1932 tekstantan jene:

"Ĉiuj ŝtatoj ekkonsideru kiel sian devon la enkondukon en siaj landoj de ĝenerala, deviga kaj senpaga instruado de blindaj infanoj. La blinduledukado okazu en specialaj edukejoj aŭ en la blindulklasoj en la normalaj lernejoj. La programo egaliĝu al tiu de la normalaj popollernejoj. La ŝtato certigu al la blinduloj krom la ĝenerala instruado ankaŭ profesian instruadon. Infanoj, kiuj pro malforteco de vidpovo ne kapablas vizitadi normalajn popollernejojn, devas vizitadi specialajn lernejojn".

La kongreso substrekas krom tio la necesecon de l' konvena prizorgo de blindaj infanoj kaj aparta eduka protekto al surdblinduloj kaj al spiritmalfortaj blindaj infanoj.

La kongreso opinias, ke necesegas ankaŭ ebligi al blinduloj, posedantaj neprajn kvalitojn, studadon en la mez- kaj altlernejoj.

3.

Konsiderante, ke la profesio de instruisto, speciale en la blindullernejoj, estas por inteligentaj nevidantoj unu el plej konvenaj profesioj, la kongreso trovas, ke necesas pli ol ĝis nun ebligi al la blinduloj tiun agadkampon. Pro la speciala valoro kaj neceso de kunlaborado inter blindaj kaj vidantaj instruistoj en blindullernejoj estas dezirinde okupadi en ili la blindajn instruistojn en kiel eble plej alta proporcio. Dezirinde estas, ke la blindulinstruistoj ricevu pli profundan fakan preparon en apartaj kursoj aŭ lernejoj (ekzemple similaj al la ŝtata instituto por speciala pedagogio en Varsovio).

4.

Konsiderante la matematikajn studojn por la blinduloj kiel gravan rimedon de ĝenerala kleriĝo kaj dezirindan fakon por nevidantoj kun specialaj inklinoj kaj talentoj, la kongreso esprimas la deziron, ke en la brajla matematikografio estu kreata unueca sistemo laŭ penadoj de ĉi-rilataj fakaj rondoj.

5.

Konsiderante la muzikon kiel gravan fakon postulantan pli solidan preparon, la kongreso rekomendas kreadon de specialaj, racie organizitaj muziklernejoj por la blinduloj. Ĝenerale la profesia instruado en blindullernejoj okazu laŭeble laŭ la principo de specialiĝo.

6.

La kongreso konstatas, ke masaĝo en alta grado konvenas kiel profesio al la blinduloj, posedantaj necesajn kvalitojn. Tial ĝi estu serioze instruata kaj subtenata flanke de ŝtato, socio kaj porblindulaj kaj blindulaj asocioj. En landoj, kie ĉi tiu profesio ĝis nun ne estas laŭplane adaptita al la blinduloj, la koncernataj faktoroj bonvolu pristudi tiun gravan problemon.

7.

La kongreso rekomendas al speciala atento de ĉiuj koncernatoj la problemon de agrikultura instruado de vilaĝanaj blinduloj por ke estu bone utiligataj ĉi-rilataj eblecoj de okupado kaj per tio evitota la koncentriĝo de blinduloj en urboj kaj deŝarĝota la mallarĝa labormerkato de la blinduloj.

8.

La kongreso konstatas, ke la laborprizorgo — unu el la plej gravaj branĉoj de blindulprizorgo — urĝe postulas efikan, laŭplanan organizadon, kaj helpon flanke de la ŝtato, komunumoj kaj ĉiuj faktoroj de blindulprotekto. Necesegas: pligrandigi la nombron de profesiaj instruejoj por junaj kaj plenkreskintaj geblinduloj; krei kaj subteni vendejojn de blindulaj laborproduktaĵoj; organizi profitan distribuadon de blindulvaroj inter la ŝtataj, komunumaj kaj privataj entreprenoj; provizi la blindul-laborejojn per malkaraj krudmaterialoj. Necesas limigi la konkurencon en la profesioj speciale gravaj kaj adapteblaj por blinduloj. Necesas laŭleĝa okupado de blinduloj en industrio en konvena proporcio; malpliigo resp. forigo de doganaj depagoj je lerniloj, laboriloj kaj krudmaterialoj bezonataj por blinduloj; konsiderinda malpliigo de impostoj. Fine necesegas certigi al la blindaj laborantoj la blindeckompenson, pri kio temas jena aparta rezolucio:

9.

La kongreso unuanime emfazas, ke la enkondukon de blindeckompenso en la socialan porblindulan leĝaron en ĉiuj ŝtatoj prezentas necesegan integralan parton de l' moderna blindulprizorgo.

La blindeckompenso celas mildigon de socialaj kaj ekonomiaj sekvoj de l' manko de vidpovo, egaligo de nevidantoj kun vidantaj samprofesianoj rilate al perlaboraj enspezoj, kaj ĝi prezentas personan rajton de la nevidanto sendependan de lia materiala stato. La kongreso konstatas kun ĝojo, ke tiu ĉi principo en diversaj formoj estas jam efektivigita en pluraj ŝtatoj, kiuj emas evoluigi ĝin en la spirito de bone komprenita sociala justeco. La kongreso akceptas kun speciala rekono la raporton de la belga kaj ĉeĥoslovaka delegitaroj, ke ĉi-tiuj ŝtatoj favore pritraktas ĉi-rilatajn penadojn de enlanda blindularo kaj esprimas la konvinkon, ke per ekkonsidero de tiuj justaj postuloj, ili ne nur grave helpos al siaj propraj nevidantaj civitanoj, sed ankaŭ konsiderinde ekinfluos la aliajn ŝtatojn surpaŝi la saman vojon.

10.

La kongreso emfazas la necesecon de aljuĝo al la blinduloj de ĉiuspecaj socialaj favoraĵoj, kiel fervojaj, tramvojaj, aŭtobusaj ktp. rabatoj ktp. kaj de specialaj aranĝoj de sanflegado k. s.

11.

La kongreso rekomendas speciale la maljunajn kaj al laboro nekapablajn geblindulojn al la sociala protekto.

12.

*Apartaj rezolucioj de la virina sekcio de l' kongreso:*

A. La blindaj knabinoj havu egalvaloran edukon kiel la knaboj.

B. En la blindullernejoj oni donu al ĉiuj knabinoj mastruman edukon kaj por plenkreskintaj blindulinoj oni aranĝu mastrumkursojn.

C. Estu starigataj loĝejoj por senhejmaj senvidulinoj, kie ili tutlibere laboru kaj vivu.

D. Blindeckompenso estu samgranda por blindulinoj kiel por blinduloj.

E. Manlaboro de blindulinoj estu pritraktata kiel plenvalora vivnutra laboro, ne kiel amuza okupado.

13.

La kongreso rekomendas al la atento de la blindulinstruistoj kaj de la blindulamikoj la skoltadon, kiel ege dezirindan kaj subtenindan junularan movadon, kiu havas gravan signifon por geblinduloj. Same la ruĝkrucan junularan movadon.

Samtempe la kongreso substrekas la urĝan necesecon plialtigi la fizikan edukon de blindaj infanoj, kiuj ĉi rilate en pluraj landoj estas neglektitaj.

14.

Konsiderante la ege favorajn spertojn faritajn en pluraj landoj koncerne la uzadon de gvidhundoj, kiuj certagrade redonas al multaj geblinduloj la sendependecon, la kongreso rekomendas pli vastan enkondukon de ĉi tiu plifaciligo por la senviduloj.

15.

La kongreso stimulas ĉiujn naciajn kaj esperantistajn blindulasociojn pliintensigi la propagandon de nia internacia lingvo sub la devizo: "Esperanto en la blindullernejojn".

*La kongresestraro.*

Honora prezidanto: s-ro E. Wagner, deputito de la pola parlamento.

Prezidanto: s-ro J. Silhan, Polujo.

Vicprezidantoj: prezidanto honorinda patro Agnello Vandenbosch, Belgujo; s-ro W. P. Merrick, Anglujo; prezidanto s-ro A. Arnesen, Norvegujo.

Sekretarioj: S-ro d-ro M. Geffner, Aŭstrujo; s-ro Peter Pesiĉ, Jugoslavio; s-ro Ch. Hedkvist, Svedujo.

Estraranoj: f-ino prezidantino E. Pollandova, Ĉeĥoslovakio; f-ino instruistino A. Melchior, Danujo; s-ino V. Thilander, Svedujo; s-ro prezidanto E. Juvonen, Finnlando; s-ro d-ro M. Bano, Hungarlando; s-ro d-ro R. Tancredi, Italujo;



Karl Bjarnhof.

# Nova libro de blinda verkisto.

La blinda dana verkisto s-ro Karl Bjarnhof publicis antaŭ nelonge novan romanon "Livets Elskere" (Amanto de la vivo). Publicisto estas la eldonejo Gyldendal en Kopenhago, la plej granda eldonejo en Skandinavio.

La romano ricevis bonan kritikon en tuta Skandinavio. Ĉi-sube ni permesas al ni citi el recenzo skribita de unu el la plej konataj literaturaj kritikistoj de Svedujo, Ivan Oljelund, en "Svenska Dagbladet", unu el la plej grandaj svedaj ĵurnaloj ĉiutagaj:

Karl Bjarnhof, kiu per "Livets Elskere" nur publicis sian trian libron, apartenas sendube al la veraj verkistoj.

La libro estas "mi-romano" en moderna Kopenhaga medio, kaj ĝi pritraktas tiel neamuzan kaj eluzitan temon kiel eksedziĝon. Ne, kompreneble ĝi ne pritraktas nur unu, sed plurajn eksedziĝojn — sed unu el ili regas. La bedaŭrinda okazintaĵo fariĝas vivproblemo por la vivo, kaj per tio tiu sola eksedziĝo atingis gravecon kaj signifon, kiu koncernas la leganton pli ol la tuta statistiko de eksedziĝoj en Kopenhago aŭ alia grandurbo dum jardeko. Kion ajn oni diras pri la verkisto, oni devas tamen konfesi, ke li havas strangan kapablon grandigi la vivon de homo ĝis dramo, kiu povus koncerni ĉiujn sed precipe tiun, kiu sidas kun la libro en la mano.

La unua parto de la romano prezentas la malrapidan, teruran perdon de sango de homa koro, kiu pli frue estis kunkreskinta kun du aliaj koroj, tiuj de la edzino kaj de la infano. Li eksedziĝas sen vera, videbla kaŭzo; estas nur tio, ke li ne estas efektiva, vera homo. Li estas egocentrulo, kiu atendas la vangofrapojn. Post la eksedziĝo li ne toleras la internan solecon, kaj tial li komencas dekadenci. Ĉio estas sensenca, kaj li rezignas. Unue li perdas sian laboron, poste sian malnovan societon kaj fine la amikojn. Liaj novaj amikoj, malfiksaj dekadenculoj, nur kompletigas la iron malsupren. Unu tagon li eĉ almozpetas en la ŝtuparoj ne sciante kiel. Alkoholo kaj sendormeco subpremas lin komplete, kaj fine, ĉe la limo de frenezeco, turmentata de halucinaĵoj, al li restas nur la revolvero. Li pafas. Tiu fina sceno estas demone timiga.

Estas nenia kinematografa dramatiko en tiu terura, malrapida evoluo malsupren, nenia malmultekosta tragiko — ĉio estas sange aŭtentika, serioza, altruda. Bjarnhof nek pentras sur la muron nek sur la tolon, li prezentas la negativon de la vivo mem. Sed li ne metas la revolveron kontraŭ la frunton kaj sendas la publikon en la eternan mallumon, kvankam oni ja ankaŭ povas tiel fari, almenaŭ laŭŝajne — la kuglo glitas, faras sulkon en la tempio, kaj la "heroo" same kiel la rigardanta leganto, estas rekondukataj al la vivo. Sed la heroo perdis la vidpovon, li vekiĝas blinda. Tamen, nur nun li vidas, li vidas, kio la vivo estas kaj kion li postulas de li. Tiu parto de la libro, kie la tuta senespera viro fariĝas amanto de la vivo, Francisko de la koro, kiu ne deziras revidi sian malnovan mondon, havas multajn inspiritajn, kortuŝajn, virece belajn flankojn. La fakto, ke la verkisto estas blinda depost sia dudeka jaro, estas bona garantio, ke la priskribo de la beleco en la vivo de blindulo estas aŭtentika.

Bonhumoro kaj satiro freŝigas tiun rakonton de sufero kaj senkonfesia konvertiĝo. Efika metodo estas ankaŭ la enkonduko en la libron de romanfragmentoj, lerte farita akompano kun plej puraj tonoj.

---

s-ro prezidanto S. Brewinski, Polujo; s-ro prezidanto jur. kand. E. Retsler, Svedujo.

La suprajn rezoluciojn la Uabo-komitato rekomendas al ĉiuj naciaj kaj internaciaj faktoroj de la blinduloj kiel esprimon de la opinio de l' Varsovia kongreso. La komitato petas, ke oni konsideru ilin bonvole kaj laŭbezone citu en memorskriboj antaŭmetotaj al enlandaj aŭtoritatoj kun necesaj konkretaj komentarioj kaj laŭlande kaj laŭ cirkonstance ŝanĝeblaj kaj realigeblaj deziroj.

Stocksund, Svedujo, septembro 1937.

*Harald Thilander* sekretario | *Jan Silhan* prezidanto



# Blinda, originala artisto.


*De IGNAZ KRIEGER.*

S-ro Berthold Ordner ĉe sia laboro.

Dum mia ĉi-jara somerferio, pasigita en nia aŭstra somerhejmo, mi konatiĝis kun blindulo, s-ro Berthold Ordner (Wien VII, Kaiserstrasse 6), kiu vekis plej altgrade mian intereson kaj sinceran admiron. S-ro Ordner nome inventis vere originalan, novmanieran, ĉarman kaj krome klarespriman artmetion. Dum kvarjara, senlaca eksperimentado li evoluis la labormetodojn de tiu ĉi artmetio je admira majstreco. Nun li praktikadas sian arton kun multaj vere ĝojigaj sukcesoj, kaj materiaj kaj ideaj.

S-ro Ordner formadas el tute ordinara metalfadeno siajn artaĵojn, kiuj ravigas la ĝurigardantojn. Temas pri diversaj figuroj — korpoj de birdoj, suĉbestoj ktp., fantazistatuoj el legendoj, el mitologioj: sfinksoj, centaŭroj ktp., alegoriaj statuoj unuopaj kaj grupaj. Tiuj ĉi artobjektoj havas altecon variantan de tri centimetroj ĝis unu metro kaj eĉ pli. Por pliigi la artistan efikon por la okulo s-ro O. uzas metalfadenojn diverskolorajn: el fero nigran, el kupro ruĝan, el latuno flavan. Ankaŭ ekzemple vitraj perloj kaj aliaj materialoj devas kelkfoje servi por pliigi la impreson. La fadenoj estas ankaŭ de variaj dikecoj. La artaĵojn li ankaŭ mem surmontas sur laŭbezone grandajn solkojn, kiuj plej ofte estas el ebono. Mirinde estas, kiel li sukcesas reprezenti ne nur korpojn troviĝantajn en stato de ripozo aŭ malaktiveco, sed ankaŭ korpojn, kiuj ĵus iel ŝajnas moviĝi: kuri, salti, flugi, batali ktp. Tio ĉi estas ebla al li kompreneble, ĉar li estis tute vidpova ĝis sia 36-a vivjaro kaj do observis proprasense kaj propresperte ĉion en la naturo. Ĉi ĉion — agojn, vivecon, morton ktp. ktp. — li al ni iluziigas pere de la simpla, ordinara malalte taksata materialo metalfadeno, drato ordinara eĉ ne ŝparinda.

Berthold Ordner naskiĝis 1889 en Wien tute vidpova. Fininte siajn studojn li fariĝis bankoficisto. Tiel li atingis estran pozicion. Li partoprenis la mondmiliton kiel oficiro ĉe la aŭstraj militfrontoj rusa kaj itala. Li estis grave vundita. Post la milito li revenis en sian antaŭan bankpozicion. En 1925 la banko tute bankrotis pro la krizo ĉiea. Ordner tiam, pro la multaj ekscitoj, unue eksuferis nervoskuon kaj poste baldaŭ tute blindiĝis. En tiu ĉi katastrofo unue tute senesperiĝante, kiel preskaŭ ĉiuj samsituacianoj, kaj dezirante ununure la morton, li tamen iom post iom rekonsoliĝis kaj trovis ree vojon al la vivo. Iun tagon li havis intuician impulson: Li ekmemoris sian iaman pasion por rigardado de pentraĵoj kaj — plastikaĵoj. Jen estis lia savo — la plastiko. Unue tute ludeme kaj nur timeme li provis formi el argilo, plastelino, vakso k. a. materialoj. Sed ili ĉiuj, pro unu kaŭzo aŭ alia, ne taŭgis. Tiam venis dua, intuicia ekpenso: Provu metalfadenojn! Ĝi estas pura, preskaŭ senkosta kaj tre formebla materialo. Post kelkaj fiaskoj venis iom post iom, dum kvarjara senlaca



Siegfried mortigas la drakon. Posedanto: La muzeo Valentin Haüy, Parizo.

aŭtodidakta studado kaj eksperimentado, fine la venkoj. Hodiaŭ, diras s-ro Ordner mem, li ree havas plenan vivĝojon, feliĉon, kiuj estas por li eĉ pli puraj ol ili estis siatempe en la mondo de la lumo. La profesio de bankoficisto esence ne kontentigis lin tiom, kiom la artmetio plastikista, en kiu li nun, el metalfadenoj, kreadas belegajn artaĵojn.

Jen mi citos al vi kelkajn el la sukcesoj de d-ro Ordner: La ŝtata blindulinstituto en Berlin-Steglitz, Germanujo, la unua aĉetis de li unue grupon de figuroj: palmon sur kiu fuĝante grimpas negro persekutata de krokodilo. Poste la sama instituto por sia muzeo aĉetis paradizbirdon, saŭron (paleontologia gigantolacerto). "National Institute for the Blind", London, aĉetis Sanktan Hubertus, t. e. cervo, kiu portas inter sia kornaro la krucon de Kristo. "Perkins Institution for the Blind" en Watertown, Usono, akiris blindan harpiston, kies harpludado estas akompanata de kantanta birdeto sidanta sur la harpo. "American Foundation for the Blind", New York, Usono, havigis al si fiŝkaptiston, kiu ĵus eltiras el la akvo fiŝoplenan reton. Samloke oni aĉetis struton. La muzeo Valentin Haüy, Paris, akiris alegorion: Siegfried mortigas la drakon. Tiu statuo havas grandecon de unu metro. La blindulmuzeo en Zürich, Svislando, aĉetis kavaliron sur ĉevalon sidantan. Li mantenas standardon kaj salutsvingas ĝin. Tiu artaĵo havas simbolan signifon. Ĝi estas dediĉita al la blinduldirektoro s-ro E. Staub, Zürich, kaŭze de lia sesdeka naskiĝotaga datreveno. "Blindenerziehungsinstitut" en Wien akiris virbovon.


Jenaj nigrepresaj blindulfakaj revuoj jam plej favore, aplaŭde recenzis la artkreadon de s-ro Ordner:

"Light", Los Angeles, "And there Was Light", New York, "Blindenfreund" Düren, Germanujo, "Schweizerische Blindenbote", Zürich, Svislando, "The New Beacon", London, "Revue Valentin Haüy", Paris, "Los Ciegos", Madrid.

La aŭstra gazetaro recenzis en la rubriko "Kunst und Wissenschaft" same kiel alilandaj tagĵurnaloj, ekz. "Le Figaro", Paris, "The Cristian Science Monitor", Boston, Usono, kaj multaj aliaj.

En la granda ekspozicio por artistoj en New York "New House Galleries Inc." en oktobro oni ekspoziciis ankaŭ artaĵojn de s-ro Ordner. De tie la ekspozicio migrados tra multaj ŝtatoj de Usono.

Anasoj antaŭ aŭtomobilo.



# Aŭdado per vibraĵoj.

*Nia surd-blinda samideano Yves Guégan, la ĝeneralsekretario de "Aidons-nous" [Ni helpu nin reciproke], rakontas en la ĉiudumonata gazeto de tiu frata asocio de franclingvaj surd-blinduloj sian interesegan biografion. El ĝi mi faras jenan eltiraĵon.*
*A. Masselier.*

... Iom post iom mi tiel nete ekdistingadis la vibraĵojn unujn de aliaj, ke ili min informadis pri ĉiuj apudaj okazintaĵoj, kaj al mi donis iluzion aŭdadi.

... Ĉar en nia vortaro troviĝas neniu vorto por traduki tian perceptmanieron, mi, kiel ĉiuj, uzas la vortojn "aŭdi, aŭskulti", kio ofte mirigas miajn kunparolantojn kaj korespondantojn, tiel ke iuj dubas, ĉu mi estas tute surda. Oni interkomunikiĝas kun mi per skribado en mia mano. Eldiri ĉiujn informojn al mi liveratajn de vibroj, tio estus tro teda. Nur per kelkaj ekzemploj mi provos la klarigon. Sur *ligna* planko, per nura kontakto de miaj piedoj, de mia seĝo, mi nete perceptas kraketon, ekfrapon de fermata aŭ malfermata pordo, bruon de al- aŭ forpaŝo. Laŭ la paŝado mi identigas miajn hejmanojn. Pri neaŭ malsufiĉe konata paŝanto mi povas aserti, ĉu ĝi estas vira aŭ ina, infana aŭ maljunula. Same pri bestoj: hundoj aŭ katoj. Antaŭe, kiam mi estis bredanta kolombojn, se iu el ili ĵus enpenetris mian ĉambron tra la malfermita fenestro, mi ĝin "aŭdis" kurantan sur la planko. Dum mi dormas, neniu povas eniri mian ĉambron, ne vekante min abrupte, escepte se tiu paŝas plej silenteme kaj vestita per pantofloj kun lanaj aŭ feltaj subplandoj. Dum uraganaj noktoj vekadas min kamenpanelo, batata de vento. Mi spertis ankaŭ okazojn jenspecajn: Antaŭ jardudeko, dum somernokto, min fortiris de dormo iu ne kutima vibro. Mi en lito surkubutiĝis, aŭskultis, kaj preskaŭ tuj kvazaŭ aŭdis rulegatan tablon en apuda ĉambro: Tiu de miaj gepatroj. Mi konsultis mian horloĝeton: estis nur la dua horo. Kio do estis okazanta? Same rebruis trian fojon. Mi ellitiĝis, rapide enpantaloniĝis kaj kuris ĉe miajn gepatrojn, kiujn mi trovis ja en lito kaj surprizataj de mia nokta vizito. Mi tuj komprenis: Sanktaj Petro kaj Paulo estis ludantaj kun globoj (kiel oni diras tie ĉi, kiam fulmotondras). Kaj mi reenlitiĝis, ridante pro mia eraro. Mi estis ekpensinta, ke ŝtelistoj estas hejme. ...

Kiam mi laboras en mia laborejo, kiu estas sur la unua etaĝo, se mia patrino aŭ edzino deziras, ke mi malsupreniru, ili neniam suprenvenas: Per stango ili plafonen frapas unu, du aŭ tri fojojn. La batonombro sciigas min, pro kiu el tri kialoj oni alvokas min. Nenio ajn planken falas, ne atentigante min, eĉ mia punktilo, eĉ paperfolio. Tamen iajn sonojn akutajn mi tute ne ekkaptas aŭ perceptas nur palpe. Tiaj estas homvoĉo, bestoblekoj, muzikinstrumentoj blovaj aŭ kordaj, horloĝpendolo, elektra sonorilo ktp. Sed, tuŝante fortepianon aŭ violonon, mi tiel nete perceptas la sonojn, ke, se la muzikaĵo estas ario de mi konata, t. e. aŭdadita dum infaneco, mi ĝin povas akompani voĉe. La domo ankaŭ estas por mi "vibrofonto", kiu al mi transigas diversspecajn eksterajn bruojn. En urbo Brest mi distingadis la diversajn veturilojn: homajn, ŝarĝajn, tramajn, kiuj pasis surstrate. Same mi apartigis la urban fanfaron kaj la soldataran muzikon.

Dum militŝipoj artilerie ekzercadis en Rodo, mi amuziĝis, nombrante la pafegojn de mi perceptatajn laŭ la ventodirekto kaj kanonkalibro je 4- ĝis 12-kilometra distanco.

Sed, kiel mi jam diris, ĉi ĉiujn vibraĵojn mi perceptas nur dank' al mema aŭ pera kontakto kun *ligna* planko. Sur kaheloj teretaĝaj de kampardomo, mi estas tute izolita, "aŭdas" nenion ajn. Ankaŭ ekstere mi perceptas nur bruegojn, kiaj estas rulado de veturiloj, de tamburo ktp. Ĉiajn naturharmoniojn, birdokantadon, ventosusuron tra folioj ktp. — ĉi ĉion mi ne konus, se mi ne estus ĝin aŭdinta kiel infano.

# La ripozhejmo de la polaj militblinduloj.

Ekspres-trajno Varszawa—Krynica, mole balancante, portas nin al Muszyna, apuda stacio de Krynica, tiu reĝino de la polaj kuraclokoj. Survoje aroj da militblinduloj aliĝas nin, veturante al la solena malfermo de la ripozhejmo de l' unuiĝo de la polaj militblinduloj. La vagonoj pleniĝas. Gaje, ĝoje muĝas amika kolegaro. Nia domo, nia kolektiva verko estas preta. Alproksimiĝas la fincelo de nia dekduhora vojaĝo. La vidantoj eksidas ĉe la fenestroj, streĉe fiks-

# Blindaj telegrafistoj.

En la jaro 1936 la hungara registaro decidis aranĝi en la porblindula laborejo en Budapest (Hermina ut. 7, Budapest XIV) kurson de telegrafado. Estas bone konata fakto, ke la aŭdado de multaj senviduloj estas tre akra, ĉar ĉe ili daŭra kaj necesega uzado de la oreloj evoluigas la aŭdadon, kiu iomete anstataŭas la vidadon. Telegrafado postulas pli ol alio lertajn orelojn, kaj pro tio ŝajnas tute nature, ke, serĉante okupeblecojn por blinduloj, la hungara registaro volis iniciati kaj monsubteni telegrafan kurson, kiu, se ni ne eraras, estas nova kaj interesa eksperimento.

Pri la teknika flanko de la afero malmulte bezonas esti dirata. Blindaj, same kiel vidantaj, kursanoj devas ja ellerni per aŭdado kaj perfekte kompreni la signojn de la Morse-a alfabeto kaj poste kodojn (mallongigarojn) uzatajn en la telegrafa trafiko, signalojn de stacioj ktp. Por legebligi al fingroj de blinduloj la ricevitajn telegramojn, oni aldonas punktilon al la aŭtomata skribilo, kiu tiam aperigas reliefe la Morse-ajn literojn. Kono de ordinara maŝinskribado ja estas necesa kompletigo de la faka instruado, por ke la blinda telegrafisto povu vidulskribe transskribi la ricevitajn komunikojn. Uzado de la telegrafa skribaparato, kiu havas klavojn skribmaŝinajn, ne estas por blindulo malfacila tasko. La kurso estis plena sukceso. La ŝtaton starigis nun propran telegrafstacion, kaj dudeko da blinduloj okupiĝis en ĝi. La ŝtataj aŭtoritatoj ŝajnas esti plenkontentaj, ĉar nova kurso similspeca estas planata.

La kursanoj estas kaj verŝajne estos ankoraŭ enloĝantoj de la laborejo menciita, kiu apartenas al "Vakok Gyámolitó Országos Eggyesülete" (apogsocieto nacia de la blinduloj), parte subtenata de la ŝtato, parte de privata bonfarado. La blindaj telegrafistoj perlaboras 70 pengojn ĉiumonate, kaj, pagante 50 pengojn al la institucio por nutraĵo kaj loĝado, ili havas por si 20 pengojn kiel poŝmonon. La salajroj de tiuj blinduloj certe ne sufiĉus por sendependa vivado, sed tamen la avantaĝo de la nova okupiga plano estas duflanka: La ŝtato utiligas inteligentan laborforton de siaj protektatoj, ŝparante bonfarajn monrimedojn antaŭe bezonatajn por ilia vivnutro. La blinduloj akiras memfidon kaj konscion pri sia valoro kaj utileco, povante labori kaj pagi siajn vivkostojn. Ili ĝojegas, ke ili ne estas enaziligitaj sed plenvaloraj homoj.

*Qualiscumque.*

---

rigardante la pentrindan pejzaĝon. Ho! Vidu! Tie! Kaj vere, subite antaŭ la okuloj ekkreskis sur la fono de arbara monto bela, impona, duetaĝa domego. Moderna konstruaĵo kun bela turo — vastaj duonrondaj, vitraj verandoj. Stop! Stacidomo. Urbeto atendas nin. La vagonaro elŝutas — veturiloj kaptas nin. Post momento ni staras jam antaŭ la preĝejo. Ene estas jam antaŭvenintoj. Post solena diservo ĉiuj kolektiĝas en la preĝejo kaj la sescent-kapa kolono marŝas preter la alvenitaj ĉefministro, dignuloj kaj milkapa rigardantaro. La orkestro ludas, la ornamita urbo salutas la marŝantojn. Baldaŭ ni plenigas la parkon antaŭ la domo, kies pordegon baras blankruĝa rubando. Paroladoj. Nia prezidanto, majoro Wagner, akcentas, ke la domo ekestis ĉefe dank' al oferoj kaj fortostreĉoj de la militblinduloj mem. La ĉefministro distranĉas la rubandon. La altpastro konsekras la hejmon, kaj ni eniras ĝin — la bela, bongusta vestiblo en helaj pastelaj koloroj. Sunplena halo arangita kiel legejo. Luksa manĝosalonego kun grandaj fenestroj direktitaj suden kun elvido tra la verda valo de Poprad, montara rivero, vigle muĝanta inter subakvaj ŝtonoj. Vasta verando kun fieraj vitroj, tra kiuj salutas nin la najbaro, frata Slovakio. Ni pasas kuirejon, administran ĉambron, kuracistan kabineton kaj per komforta ŝtuparo atingas la unuan kaj duan etaĝojn. Tie, ambaŭflanke de vasta koridoro, estas 2- ĝis 4-litaj dormoĉambroj. Eleganta interna aranĝo. Lavkabinetoj kun fluanta varma kaj malvarma akvo. Ĉiuetaĝa banejo. Centra hejtado. Ju pli alten, des pli bela elvido ĉiuflanken. Sunriĉa, bonklimata estas Muszyna. Efikaj mineralaj fontoj, acidokarbonaj, gasaj kaj marĉaj banoj, rivera strando — ĉi ĉio certigos al ni ne nur agrablan ripozon, sed ankaŭ sanigon, precipe por tiuj, kiuj suferas pro anemio, reŭmatismo, stomakaj malsanoj, arterioklerozo. Entute nia hejmo proponos ripozon al 60 gastoj. Kuracado, minerala kaj marĉa banado estos senpagaj. Tion prizorgos malsanula asekuro. Ekskursoj en la ĉirkaŭaĵojn ĉiel penindas, ĉar Muszyna situas meze inter la plej famaj karpataj kurac- kaj banlokoj. Vere gravan sukceson festis la rondo familia de polaj militblinduloj, kiuj de nun ofte renkontiĝos tie ĉi en propra, memkreita, sunplena hejmo.

*Jan Silhan.*



# La blinda ĥoro Homeros.

Ĥora kantado estas nobla artesprimo, kiu realiĝas per kunlaborado de muzikemaj homoj el ĉiuj sociaj klasoj. En kelkaj landoj ĝi fariĝis gravega formo de la ĝenerala popolklerigo, per kiu tradukiĝas en la subtilan lingvon de harmonio profundaj sentoj de anima interkompreniĝo, de arta ĝuo kaj de patrolanda amo. Ĥora kantado estas ankaŭ bonega distriĝo post monotona dumtaga laboro.

Blinduloj ĉiam flegis ĥoran muzikon en kelkaj grandaj lernejoj, sed estas konsilinde, ke ankaŭ en la ĝenerala vivo, kiam ekzistas eblecoj por facila kunvenado, ili organizu ĥorajn societojn, ĉar ili trovos per tio okazon kunestadi kaj amuziĝi, kaj samtempe altiri al si simpation kaj intereson de la viduloj, kiuj emos konatiĝi kun iliaj seriozaj vivdemandoj.

En Germanujo organizado de blindulaj ĥoroj belege efektiviĝas, kaj tie eldoniĝas ankaŭ brajla gazeto pri la fako.

Mi intencas nun iomete rakonti pri la blindula ĥoro Homeros en Budapest, laŭ sciigoj elĉerpitaj el la vidula hungara gazeto "Délibáb".

En la salono de la blindula azillaborejo subtenata de "Vakokat Gyamolsto Országos Egyesület" (Tutlanda apogasocio de blinduloj) kunvenadas la 75 anoj de la ĥoro Homeros sub la lertega direktado de Gustav Schnitzl, kiu en nur kelkaj jaroj sukcesis fari veran miraklon. Frukto de lia pacienca laboro estas, ke la ĥoro Homeros de ĉiuj kompetentuloj estas nun rekonata kiel la plej perfekta ĥoro de Hungarlando, povante sin kompari kun kiu ajn mondfama ĥoro. Ĝi ricevis la plej altan honoron, la premion de la hungara regnestro. Ĝi donis jam multegajn koncertojn en la ĉefurbo kaj en la provincoj, kaj se oni havus monon, diras sinjoro Schnitzl kun ĝemo, oni irus eksterlanden por konigi la muzikan kapablon de la hungara blindularo.

La ĥoro Homeros havas vastegan repertuaron kun pli ol cent pecoj, de ĉiuj famaj komponistoj, kiel la hungaroj Liszt, Kodaly, Hubay, Bartok kaj la majstroj de multaj landoj. Nuntempe la ĥoro lernas verkon de hungara blindulo Karoly Mathesz, kiu instruas muzikan estetikon ĉe usona universitato.

Oni povas demandi, kiel direktas la ĥorestro blindulan ĥoron, kies membroj ja ne vidas liajn movojn. Nature la tasko de tia ĥorestro estas malfacila: Nevidantoj devas parkere lerni siajn partiojn kaj per multega ripetado koni ĉiujn nuancojn de la kanto por atingi artan perfekt-



S-ro Gustav Schnitzl, gvidanto de la ĥoro Homeros.

econ. Sinjoro Schnitzl unue provis igi la blindulojn legi siajn partiojn notitajn laŭ la brajla muzikskribo, sed li konstatis, ke palpado de la reliefaj muziknotoj distras la ĥoranojn kaj malhelpas la muzikan nuancadon. Do li revenis al la parkera lernado. Por gvidi la multajn partiojn de granda ĥorverko li moviĝas rapide kaj senbrue de unu al alia voĉgrupo kaj kantetas al ili la komencon aŭ la enviciĝon en la muzika tutaĵo. Li nomis sin mem "la moviĝanta ĥorestro". Je la komenco de la kantado li kantetas la unuajn du taktojn de la peco, kaj la blinduloj ekkantas senerare. Antaŭ la mikrofono li uzas la saman metodon, kaj oni rimarkas nenion pri tio.

*G. Valiani.*

## La unua "parolanta libro" en Esperanto

estas estigita por Uabo de "National Institute for the Blind", 224 Great Portland Street, London W. 1, Anglujo. Ĝi enhavas rakonton, "La karavano", de Wilhelm Hauff, tradukitan de J. W. Eggleton kaj legitan de nia angla samideano sinjoro Fred Wadham (Holmbury, Woodcote Hurst, *Epsom*, Surrey). La rakonto ampleksas nur unu diskon, kaj ĝi estas tre sukcese farita. Elkore ni dankas la nacian instituton por blinduloj kaj sinjoron Wadham pro tiu ĉi grava helpo.

La disko estas farita laŭ la rekta (senpera) metodo en kvar ekzempleroj kaj aplikita laŭ turnrapideco de 24 turnoj ĉiuminute.

Unu ekzemplero de la disko estas donita al la nacia instituto por eniri ĝian diskotekon, unu ekz. estas sendita al Polujo por la dekkvara kongreso de blindaj esperantistoj, kaj du ekz. restas ankoraŭ ĉe la sekretario de Uabo.

Nun, kompreneble, aperas la demando, kie prefere estu nia esperanta diskoteko. Nenio estas ankoraŭ decidebla pri tio. Intime ligita al internacie cirkulanta diskaro ja estas la demando pri dogana senpageco, demando iom malfacile ordigebla pro la facila misuzebleco de tia senpageco. Niaj sondiskoj ja tre malmulte diferencas de ordinaraj gramofondiskoj.

## Rumana sukceso.

**De Al. I. Stoenescu.**

La rumana blindul-organizo Sprijinul Orbilor din Rumânia — blindulhelpa organizo de Rumanujo — penas ĉiudirekte veki amon al la blinduloj ĉe la vidantoj, ĉar nur tiel oni povas plibonigi ilian nunan kompatindan sorton. Okaze de ĉitiea ekspozicio "Luna Bucurestilor" la supre menciita organizo intervenis ĉe s-ro ĉefurbestro Al. Donescu kaj ĉe s-ro deputito Batzaria, prezidanto de la ekspozicio, kaj akiris specialan pavilonon por blinduloj. Krom tio, ke estas ekspoziciataj diversaj objektoj koncernantaj la blindulojn, kelkaj senviduloj laboras brosojn, korbojn ktp., skribas kaj legas publike. Bonega propagandmaniero! La publiko montras vivan intereson, kaj miloj da personoj admiras la laboron de la blinduloj. Same, ankaŭ s-ino Tatarescu, edzino de la ĉefministro de Rumanujo, afable bonvolis konsenti al la organizo pavilonon ĉe la ekspozicio "Rumana Laboro", kie estas ekspoziciataj kaj vendataj nur laboraĵoj de blinduloj. En la tagoj kiam la ŝtatgvidantoj komprenos, ke ankaŭ blinduloj kapablas esti utilaj al la socio, la blindulproblemo estos racie solvata kaj la sorto de la senviduloj estos plibonigita.

La Sprijinul Orbilor din Rumânia, kvankam ĝi renkontas ĉiajn malfacilaĵojn, tamen kun firma kredo je venko batalas por pli bona estonto de la blinduloj.

## Nova blindul-organizaĵo en Jugoslavio.

La monato septembro 1937 ŝajnas fariĝi historia en la blindula vivo en Jugoslavio.

Laŭ la iniciato de s-ro direktoro Veljko Lj. Ramadanoviĉ la naŭan de septembro okazis en la blindulinstituto de Zemun fondanta kunveno de "Societo de Blindaj Intelektuloj kaj Ekonomoj de la Reĝolando Jugoslavio".

La societo estas tutlanda kaj ĝia celo estas moralaj kaj materiaj protekto kaj prizorgo de la blinduloj.

Krom nevidantaj geinstruistoj kaj metiaj majstroj institutaj kaj krom aliaj memstaraj senviduloj la kunvenon partoprenis direktoro s-ro V. Ramadanoviĉ, vickolonelo s-ro Lujo Lovriĉ, inspektoro de la ministro de popola klerigado s-ro Anton Skala, okulkuracisto el Zemun s-ro Milorad Ĉortanoviĉ kaj kelkaj fakaj blindulinstruistoj.

Unuanime oni akceptis la regularon kaj elektis estraron, en kiu la ĉefajn postenojn okupas: Prezidanto vickolonelo s-ro Lujo Lovriĉ; unua vicprezidanto direktoro s-ro V. Ramadanoviĉ (vidanto); dua vicprezidanto inspektoro s-ro Anton Skala (vidanto); sekretario s-ro Peter Pesiĉ; kasisto oficisto de la Zemun-a blindulinstituto s-ro Blagoje Miliĉeviĉ.

Oni sendis saluttelegramojn al L. M. Reĝo Peter II, al Ŝ. M. Reĝino-Patrino Marija, al L. M. Princo-Reganto Pavle, al la ministro-prezidanto s-ro d-ro Milan Stojadinoviĉ kaj al ministro de sociala politiko kaj popola sano d-ro Dragiŝa Cvetkoviĉ. De ĉiuj venis favoraj respondoj.

La elektita komitato jam ekagis kaj la societan regularon jam sendis por aprobo al la ministrio de internaj aferoj en Beograd. La societo fariĝos membro de nia UABO.

## Paŝo al efika tutslava kunlaborado inter la blinduloj.

La 28-an de septembro 1937, en ĉeesto de reprezentantoj de blinduloj en Jugoslavio, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio kaj Polujo, okazis fondanta kunveno de "Slava Asocio por protektado de la Blinduloj".

Jam laŭ la nomo de la asocio oni povas konkludi, ke ĝia celo estas materia kaj morala protektado de la blinduloj en la slavaj landoj.

La asocio estas fondita laŭ la iniciato de s-ro Veljko Lj. Ramadanoviĉ, kaj siatempe al kompetentaj personoj kaj organizacioj oni sendis proponon de la asocia regularo, tiel ke ĝi ĝustatempe povis esti pritraktata de ili.

Estis legata paragrafo post paragrafo kaj farataj rimarkoj de ĉeestantoj, tiel ke post nelonga pritraktado estis akceptita definitiva teksto de la regularo.

Sekvis elektado de komitato, en kiun inter aliaj eniris kiel: prezidanto vickolonelo s-ro Lujo Lovriĉ el Zemun; vicprezidantoj: por Ĉeĥoslovakio prezidanto de la asocio de blindul-societoj en Ĉeĥoslovakio s-ro Karel Jelinek el Praha; por Pollando, direktoro de la ŝtata instituto por blinduloj kaj surdmutuloj en Varsovio, s-ro Edward Zawadzki (vidanto); por Bulgarujo, majoro s-ro Ilija Minkov el Sofia; por Jugoslavio, direktoro de la blindulinstituto en Zemun, s-ro Veljko Lj. Ramadanoviĉ; sekretario inspektoro de la ministerio de popola klerigado en Jugoslavio, s-ro Anton Skala el Beograd; kasisto oficisto de la Zemun-a blindulinstituto, s-ro Blagoje Miliĉeviĉ.


# Ligilo por Vidantoj.

Abonprezo: Unu sveda krono aŭ kvar internaciaj respondkuponoj.

Mendebla kaj pagebla ĉe:

*Anglujo:* S-ro W. P. Merrick, Penso, *Shepperton.*

*Belgujo:* F-ino G. Dubois, 44 rue des Six Jetons, *Bruxelles.*

*Bulgarujo:* S-ro D. Kolev, Bulevard Ferdinand 37, *Sofia.*

*Ĉeĥoslovakio:* S-ro Robert Bloch, *Praha-Smichov,* 106.

*Danujo:* F-ino Agnes Melchior, Det Kgl. Blindeinstitut, *Kalundborg.*

*Finnlando:* S-ro Einar Juvonen, Pengerkatu 11, *Helsinki.*

*Francujo:* S-ro Et. Bouquin, 29. rue Fénélon, *Saint-André,* Nord.

*Hungarlando:* S-ro Doktoro Bano Miklos, Vegvarutca 2. *Budapest III.*

*Italujo:* S-ro Profesoro Raffaele Tancredi, Via S. Lorenzo 26—8, *Savona.*

*Jugoslavio:* S-ro Simon Roth, *Stari Becej.*

*Nederlando:* S-ro R. Israëls, *2 Exloërmond.*

*Norvegujo:* S-ro Inĝ. O. Brochmann, Sletteröd, Trollsvingen 5, *Ullevål Haveby.*

*Polujo:* S-ro Kapitano Jan Silhan, Kolonia Profesorska, *Lwow.*

*Portugalujo:* S-ro J. Albuquerque e Castro, L. Dos Aviadores 97, *Gaia.*

*Svedujo:* S-o Charles Hedkvist, *Stocksund.*

*Svislando:* S-ro E. Meister, Kirchgasse, *Spiez,* Kanton Bern.

*Usono:* S-ro Josef R. Scherer, 4474 West Adam's Street, *Los Angeles,* California.

# Blindulfakaj notoj.

(Red. G. Valiani, via Dalmazia 58, Pistoia, Italujo.)

## Anglujo.

Antaŭ nelonge oni starigis en Londono informejon ligitan al la ministerio de publika sano. Ĝi okupos sin speciale pri statistiko koncerne heredan blindecon en ĉiuj kulturŝtatoj.

La blinda sciencisto Wilkinson mortis antaŭ nelonge en aĝo de 80 jaroj. Li havis la por blinduloj laŭŝajne nekonvenan profesion de botanikisto, kaj de post j. 1913 li estis honora profesoro ĉe la universitato de Leeds. Spite de tio, ke li blindiĝis jam kiel dudek-jara junulo, li funde konis sian sciencon.

La internacia ligo por kontraŭbatalado de blindeco, kiu fondiĝis en j. 1924 de d-ro Lossouarn kaj du ĥinaj kuracistoj, eldonis raporton pri sia agado dum la lastaj kvin jaroj. Laŭ tiu raporto, sole dum la j. 1932, 10,871 malsanuloj estis traktataj, kaj la kuracistoj de la ligo faris injektojn al 2,500 personoj por antaŭgardi ilin kontraŭ malsanoj, kiuj povas kaŭzi blindecon. Dum sama jaro estis distribuataj al 600 misiistoj 127 pakaĵoj da medikamentoj kun 125,000 dozoj por injektado.

## Belgujo.

Antaŭ kelkaj jaroj estiĝis en Belgujo filantropia movado, kiu celas porti al malsanaj homoj la benon de senpaga instruado, ĉu kiel distrado, ĉu kiel preparo por la vivbatalo. Antaŭ du jaroj la homama organizaĵo "Équipes Sociales Auxilia", 12 rue St. Quensin, Bruxelles, proponis siajn servojn ankaŭ al la blinduloj, kaj dank' al kunlaborado de "Ligue Braille", kiu transskribadis la necesajn librojn en brajlon, la entrepreno bele progresas. Multaj geblinduloj partoprenas kursojn de lingvoj, filozofio, literaturo, juro ktp. Stabo de vidantaj geinstruistoj donas lecionojn per korespondado kun laŭdinda fervoro.

## Francujo.

De la 19-a ĝis la 21-a de julio 1937 la francaj geblinduloj havis sian profesian kongreson. Oni pridiskutadis en fakaj kunsidoj ĉiajn demandojn de profesioj nuntempe ekzercataj de la blinduloj, precipe demandojn pri muziko, masaĝo, stenodaktilografio, agordado de fortepianoj, komerco ktp. Oni proponis starigon de profesiaj kursoj perfektigaj dum la somero, kaj oni postulis plibonigon de la profesia instruado en la lernejoj. — Preterpase oni informiĝas, ke la kongreso okazis en la ejoj de la "Institut de Pédagogie Musicale", fondita kaj gvidata laŭ propraj metodoj de la blinda muzikprofesoro Raymond Thiberge, kiu estis la prezidanto de la kunveno. S-ro Thiberge evoluigis interesegan sistemon por la blinduloj, kiuj volas instrui muzikon al vidantoj. Tiu sama sistemo, kiu meritus esti pli vaste konata, estas aplikebla ankaŭ en la ĝenerala, publika muzikinstruado. Li publikigis multajn pedagogiajn verkojn.

## Hungarlando.

Premiojuĝa komisiono de la hungarlanda industria ministrio, post objektiva kaj severega ekzamenado, elektas, ĉiun kvinan jaron, metiiston indan je la granda honoro ricevi la "oran kronon" kaj nur unu metiisto el ĉiu fako ricevas la gravegan rekompencon. La "ora krono" ne signifas, ke la premiito laboras nepre plej lerte inter lertuloj, sed ke lia laboro montras escepte bonajn rezultojn. Pro tio la premio estas tiel honoriga kaj tiel bona reklamo.

Lastan jaron, okaze de la foiro de artikloj por loĝeja uzo, Gyula Molnar, blinda penik- kaj brosfabrikisto, ricevis la oran kronon. Krom li nur unu samfakulo (vidanto) ricevis ĝin, ricevinte ĝin antaŭ dek jaroj. Dum la sama foiro ankaŭ alia blindulo, Sandor Szigeti, akiris la grandan oran medalon pro siaj brosproduktaĵoj.

## Usono.

La plej alta juĝejo (The Supreme Court) de la ŝtato Illinois havas nun kiel prezidanton la blindan juĝiston Paul Farthing. Li blindiĝis sekve de ĉasakcidento en sia 12-a jaro, kaj, trairinte blindullernejon kaj akirinte juran diplomon en la universitato de sia ŝtato li sukcese praktikadis kaj gajnis la konfidon de ĉiuj kaj nun fine atingis unu el la plej altaj postenoj sur la jura vivvojo.

En la ŝtato California la blinduloj estas delonge tre bone prizorgataj. Dum la jaro 1937 la parlamento altigis refoje la blindulpension, kiu nun antingas la altecon de 50 dolaroj ĉiumonate por tiuj, kies vivcirkonstancoj konfirmiĝas kun la leĝaj reguloj. La ricevantoj de la pensio povas enspezi 33,33 dolarojn ĉiumonate, kiu sumo ne estas forprenebla el la pensio.

31 el la usonaj ŝtatoj nun enleĝigis pensiojn por la blinduloj.

# Organizaĵoj unuiĝintaj en U. A. B. O.

## Naciaj neesperantistaj organizaĵoj.

BULGARUJO:

*Drujestvo na bulgarskite slepi* (Asocio de bulgaraj blinduloj). Ploŝtad Slavejkov 1, *Sofia.*

ĈEĤOSLOVAKIO:

*Svaz slepeckych spolku* (Ligo de blindulorganizaĵoj). *Praha-Zizkova,* Krasova ul. 5.

DANUJO:

*Dansk Blindesamfund* (Dana blindulfederacio). Bogensegade 2, *Köbenhavn Ö.*

FINNLANDO:

*Sokeain keskusliitto* (Centra blindulfederacio). Pengerkatu 11, *Helsinki.*

*Suomen sokeain kirjallisuusyhdistys* (Finna literaturasocio porblindula). Pengerkatu 11, *Helsinki.*

HISPANUJO:

*Federacion Hispanica de Ciegos* (Federacio de hispanaj blinduloj). Valldoncella 30, *Barcelona.*

HUNGARLANDO:

*Vakok szövetsége* (Federacio de blinduloj). István-ut. 27, *Budapest VII.*

IRLANDO:

*Irish Association for the Blind* (Irlanda asocio por la blinduloj). 35 North Great George's Street, *Dublin.*

NORVEGUJO:

*Norges Blindeforbund* (Blindulfederacio de Norvegujo), *Jessnes.*

POLLANDO:

*Zwiazek ociemnialych zolnierzy R. P.* (Asocio de militblindigitoj de la Pola Respubliko). Hoza 1 M. 2., *Warszawa.*

SVEDUJO:

*De blindas förening* (Asocio de la blinduloj). Majorsgatan 12, *Stockholm.*

## Naciaj esperantistaj grupoj.

BULGARUJO:

*Blindul-esperantista grupo Balkana Stelo.* Ploŝtad Slavejkov 1, *Sofia.*

ĈEĤOSLOVAKIO:

*Societo de ĉeĥoslovakaj nevidantaj esperantistoj. Praha-Smichova, 106.*

DANUJO:

*Dana asocio de blindaj esperantistoj.* Det Kgl. Blindeinstitut, Refsnæs, *Kalundborg.*

FINNLANDO:

*"Steleto".* Pengerkatu 11, *Helsinki.*

HUNGARLANDO:

*Blindaj esperantistoj loĝantaj en la Hungara Reĝolando.* Vegvar-utca 2, *Budapest III.*

ITALUJO:

*Itala asocio de blindaj esperantistoj.* Via S. Lorenzo 26—8, *Savona.*

JAPANUJO:

*Japana asocio de blindaj esperantistoj.* S-ro profesoro T. Iwahashi, Kwansei Gakuin College, *Kobe.*

JUGOSLAVIO:

*Nova Lumo.* Dom slepih viteškog Kralja Aleksandra I Ujedinitelja, *Zemun.*

NEDERLANDO:

*Nederlanda societo de blindaj esperantistoj. 2. Exloërmond.*

SVEDUJO:

*Sveda asocio de blindaj esperantistoj. Stocksund.*



Sture-Tryckeriet, Stockholm 1938

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA K. U. L.